## kotizoj:

| Eŭroj (€) | simpla ĉambro (lavabo) | luksa ĉambro (duŝo+necesejo) |
|---|---|---|
| 0 - 3 jaroj sen propra lito | 0 | 0 |
| 4 - 10 jaroj | 110 | 130 |
| 11 - 15 jaroj | 140 | 180 |
| 16 - 25 jaroj | 165 | 220 |
| pli ol 25 | 215 | 270 |
| unulita ĉambro | 255 | 320 |

La kotizo inkluzivas loĝadon, 3 manĝojn tage kaj endoman programon. Ekskursoj estas surloke aparte pagendaj. Materialon por manlaboroj oni pagas laŭ uzita kvanto surloke.

## rabatoj:

- por fruegaj aliĝintoj ĝis 30.11.2005: **15 €**
- por fruaj aliĝintoj ĝis 31.01.2006: **10 €**

en formo de bonhavaj kuponoj por pagi en nia trinkejo.

## subvencioj:

por partoprenantoj el nepagipovaj landoj laŭ niaj financaj ebloj kaj eventuala programkontribuo. Bonvolu priskribi vian eblan kontribuon al la programo. Oficialajn invitilojn ni sendas nur al homoj kies programkontribuon ni akceptis.

## krompagoj:

por ne-membroj de GEA/GEJ loĝantaj en Germanio: **25 €**

## kondiĉoj:

Via aliĝo ekvalidas nur per antaŭpago de minimume **50 €** por ĉiu persono. Ĝi estas parto de la kotizo. La antaŭpago minus 10 € estos repagata nur post ĝustatempa malaliĝo antaŭ la 15-a de marto 2006.

Eksterlandanoj pagu nur post ricevo de nia skriba konfirmo per la tie menciita konto. Ni volas redukti ĝis minimumo la altajn bankkostojn.

## aliĝoj informoj

**Germana Esperanto-Asocio**
Wolfgang Bohr
Johannes-Kirschweg-Str. 11, D-53474 Bad Neuenahr - Ahrweiler
Telefono: +49-(0)2641-4885

## pagoj


€ **Bank für Sozialwirtschaft (bankkodo/Bankleitzahl 550 205 00)**
**konto-numero: 86 03 601,** BIC-kodo: BFSW DE 31 MNZ
IBAN-kodo: DE32 5502 0500 0008 6036 01
Deutscher Esperanto-Bund e.V., rimarko: „22-a PSI"

psi@esperanto.de
http://www.esperanto.de/psi

# 22a PSI

printempa semajno internacia

germana esperanto-asocio http://www.esperanto.de/psi



la paska renkontiĝo por la tuta familio

Denove en

## St. Andreasberg, 10 – 17 aprilo 2006

Germanio, montaro Harz

# PSI
**Printempa Semajno Internacia**

estas fama internacia renkontiĝo por la tuta familio. Ĝi okazas ĉiujare dum unu semajno ĉirkaŭ pasko ie en Germanio. Por la 22-a PSI ni atendas pli ol 160 partoprenantojn el pli ol 15 landoj, el kiuj minimume triono estos infanoj diversaĝaj.

## familioj

PSI estas precipe familia seminario. La programo celas kontentigi samrajte plenkreskulojn, junulojn kaj infanojn. Sed tio ne ekskluzivas unuopulojn, ĉiu estas bonvena.

## infanoj

Okazas apartaj programeroj por infanoj laŭ aĝo kaj lingvokono. Kaj komencantoj kaj flue parolantoj havos sian programon. Gepatroj do havas bonan okazon trankvile partopreni siajn programerojn sen infanoj - aŭ kun la infanoj, se ili preferas.

## junuloj

En la kadro de PSI okazos speciala programo por junuloj pli ol 10-jaraj. Por ili okazas kursoj, ludoj, dancoj kaj aliaj programeroj. Ili povas loĝi en komunaj ĉambroj kaj lernas, ludas kaj festas kune.

## komencantoj

Se vi aŭ via partnero aŭ ambaŭ estas komencanto(j) aŭ eĉ neesperantisto(j), ne timu. Vi estas bonvenaj! Ni aranĝas kursojn por komencantoj kaj progresintoj. Sed ankaŭ aliaj programeroj konsideras la komencantojn.

## programo

La seminario enhavas kaj *laborajn* kaj *distrajn* elementojn por ĉiuj aĝoj. Certaj programeroj fariĝis jam tradiciaj:

- **Diskutgrupoj kaj prelegoj**
  pri plej diversaj temoj
- **Kursoj**
  pri ludoj, dancoj, kantoj, muziko, ...
- **Lingvokursoj**
  por komencantoj, progresintoj kaj infanoj
- **Mazi-kursoj**
  ĉiutagaj por infanoj.



- **Nacilingvaj kursetoj**
  parolantoj de diversaj lingvoj prezentas sian lingvon en mallonga kurseto.
- **Artaj manlaboroj**
  pri ornamaĵoj, pentrado, ŝtofoj, origamio, ...
- **Ekskursoj**
  al vidindaĵoj en la regiono kaj najbaraj urboj
- **Kineja horo**
  ĉiutage je fiksita horo vi povas spekti video-filmojn aŭ lumbildojn.
- **Literatura angulo**
  Ĉiutage aŭtoro aŭ libroamanto prezentas sian libron
- **Vespera kultura programo**
  koncertoj, prezentaĵoj, magio, ...
- **Kafejo - trinkejo – babilejo**
  ĉiutage malfermita.
- **Kaj ... eble via oferto ...**

Impresojn pri pasintaj PSIoj vi trovas en Interreto:
**http://www.esperanto.de/psi**

# St. Andreasberg




estas urbeto situanta en bela regiono en la koro de la montaro *Harz*. Ĝi situas do proksimume meze de Germanio kaj estas de ĉiuj flankoj bone atingebla – alvojaĝo eblas per trajno kaj buso tra la urboj Bad Harzburg, Goslar kaj Herzberg. Ni organizos transportservon de Bad Harzburg. Pliaj informoj en la dua informilo!

En la regiono troviĝas la monto *Wurmberg (971m)*, aventurludejo en *Sieber*, fera artgisejo en *Ilsenburg*, stalaktita kaverno en *Bad Gund*, la *Okerlago* (por migrado aŭ vaporŝipveturado), la kastelo *Herzberg* de la dinastio Welfen kaj multaj aliaj vidindaj kaj interesaj ekskursceloj. Proksimaj urboj invitantaj al vizito estas ekzemple *Goslar*, *Wernigerode*, *Braunschweig* kaj *Göttingen*.

Interreto: http://www.oberharz.de/Andreasberg

SONNENBERG

# La PSI-ejo

## Internationales Haus Sonnenberg
(*Internacia Domo Sunmonto*)

*Haus Sonnenberg* estas institucio de internacia junulara, plenkreskula kaj familia klerigado kun membroj en multaj landoj. Ĝi okazigas ĉiujare pli ol 200 aranĝojn malfermitajn al ĉiuj interesitoj.

La ejo estas komplekso de pluraj domoj aranĝitaj en tuja najbareco sur vasta tereno sur ebenaĵo en alteco de 700 m.

Loĝado kaj programo okazos kune. Ni okupos kelkajn domojn kaj disponos pri aro da unu-, du- kaj plurlitaj ĉambroj kaj do povas kontentigi same familiojn, parojn kaj unu-opulojn.

La plimulto de la PSI-partoprenintoj samopinias: la Internacia Domo Sonnenberg estas ideala ejo por esperantistoj.

La seminariejo estas moderne kaj bonege ekipita por niaj celoj:

- multaj diversgrandaj salonoj
- televidiloj, projekciiloj, komputilo
- biblioteko
- fotolaboratorio
- metiejoj
- tablotenisejo, tablofutbalo
- interpreta instalaĵo
- scenejo
- trinkejo / kafejo, diskoteko
- ekstera ludtereno por infanoj



Interreto: www.sonnenberg-international.de

Busa transportservo ek de Bad Harzburg